§ Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Oktobro : 5 2022

## SUBSKRIBITA INTERKONSENTO PRI MARAJ LIMOJ INTER ISRAELO KAJ LIBANO

La pasintan 27an de oktobro, Israelo kaj Libano ne subskribis pac-akordon, tamen ili aprobis interkonsenton por fiksi sian maran limon. Ĉi tiu konsento ebligos la ekspluatadon de gasaj tavoloj tie ekzistantaj. Fakuloj pri internaciaj rilatoj asertas, ke ĉi tiu interkonsento malfaciligos ontajn konfliktojn inter Israelo kaj la libana grupo Hizbulaho.

Unue, estas necese diri, ke Libano oficiale ne agnoskas la israelan ŝtaton, inter ili eĉ ekzistas milit-stato depost la jaro 1967. Pro ĉi tiu malagnosko, ankoraŭ ne ekzistas certa mara limo inter ambaŭ ŝtatoj. Lastatempe oni eltrovis, ke tie ekzistas grandaj gas-tavoloj. Tiel, Libano forgesis tiun malagnoskon kaj decidis atingi interkonsenton por ekspluati la zonon. Verdire, Libano bezonas monajn rimedojn, kiuj tutcerte alvenos post la ekspluatado kaj disvendado de la gaso, speciale nun, kiam gaso estas altvalora resurso post la milito en Ukrainio kaj la problemoj en la disvendado de rusa gaso en okcidentaj landoj.



Israelo ankaŭ atingas profitaĵojn, inter ili, ĉi tiu ŝtato ricevos 17% el la gaso vendita. Alie, temas pri interkonsento kun plia araba ŝtato, subskribo de pacaj akordoj kun arabaj landoj estas celo de Israelo en la tiel nomataj “Interkonsentoj de Abrahamo”.

Kiel dirite, Libano ne agnoskas diplomatie Israelon, do, ambaŭ ŝtatoj ne subksribis rekte la akordon. Tiel, reprezentantoj de Bejruto kaj Jerusalemo vojaĝis en la garnizonejon de UN-soldatoj en landlima vilaĝo Naqoura. Tie, ambaŭ reprezentantoj lasis la akordon subskribitan al la organizanto de la renkontiĝo, la usona diplomato Amos Hochstein. Libano petis okazigi tiun akton sen la ĉeesto de amaskomunikiloj kaj kun la evito de kia ajn man-premo inter ambaŭ reprezentantoj.

# *Vorto de la Semajno*

## Avalo:

Garantio pri kambio donita de tria persono, kiu devontigas sin pagi la sumon, se ĝi ne estos pagita de la subskribinto.

**Avali***:* surmeti sian avalon sur kambion

Sinonimoj: *Garantii, garantio.*

*La entrepenisto ne povis pagi ĝustatempe la ŝuldon, pro tio la banko fine pagis ĝin, ĉar ekzistis avala kontrakto inter ili.*

Pro la fakto, ke kelkaj entreprenoj (ekz. bankoj) kaj privatuloj dediĉas sin profesie al avalado, oni povas diri, ke tiu profesiulo estas AVALISTO. Male, se privatulo sporade avalas juran negocon al alia homo, ekz. familiano, tiam li estas AVALANTO.






Ni jam komencis redakti novan numeron de

***JURA TRIBUNO INTERNACIA***

Ĉu Vi deziras kunlabori en la revuo pere de artikolo, eseo, informo ktp?

Ek! La jura revuo en esperanto ankaŭ estas via revuo!

Kontaktu kun: jurista@esperanto.ac